

Kampanjo de André Bieler
Claude Gacond, 151-a radioprelego, 1966.08.24 & 1966.08.27

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

De kelkaj jaroj sinjoro André Bieler, ĝeneva pastoro kaj ekonomiisto, estas konata en Svislando pro sia kampanjo pri helpo al la subevoluintaj landoj.

A.- Laŭ sinjoro André Bieler, en la riĉaj landoj iu procento de la milita buĝeto devus esti dediĉita al la internacia kooperado. Tiel li volas montri, ke helpo al la mizeraj landoj estas intime ligita al la malarmado.

Cl.- La ideoj de sinjoro André Bieler estas konataj en Svislando sub la titolo **Propono Bieler**.

A.- Dum la pasintaj monatoj tiu Propono Bieler estis atente ekzamenata en diversaj rondoj: en medioj favoraj al la internacia kooperado kaj en protestantaj parokoj. Ĝi iom post iom ricevas subtenon de multaj intelektuloj kaj de multaj protestantoj. Montriĝas, ke la svisa protestanta opinio favoras tiun Proponon Bieler.

Cl.- Pro tio tiu Propono Bieler fariĝis unu el la labortemoj de la kunveno de la Federacio de la Protestantaj Eklezioj de Svislando, kiu okazis en Bazelo la 19, 20 kaj 21-ajn de junio.

A.- Tiu propono konsistas el 14 tezoj. 12 el ili estis akceptitaj kiel esprimante la oficialan vidpunkton de la Svisaj Protestantaj Eklezioj. Kaj tuj tiu 12-teza dokumento estis sendita al la Ekumena Konsilantaro de la Eklezioj por esti ekzamenota internaciskale. Kaj en Svislando mem tiu dokumento estis abunde diskutata. Ĝi renkontis ĝeneralan apogon en plej diversaj medioj, kvankam ĝi estas sufiĉe revolucia.

Cl.- Ni ne povas traduki la tutan tezaron, kiun adoptis la Federacio de la Protestantaj Eklezioj de Svislando, ĉar temas pri longa teksto. Ni provos ĝin resumi kaj ni citos la plej gravajn erojn.

A.- La unua tezo konstatas, ke komence de 1966 la popoloj estas jam mezvoje en la jardeko por ekonomia progreso decidita de UN en 1960 kaj ke la rezultatoj estas pli malfavoraj, ol ĉio imagita. Kreskas la mizero en la subevoluintaj loĝantaroj.

Cl.- La dua tezo analizas la kaŭzojn de tiu malekvilibro kaj konkludas, ke « *la vera komuna problemo por ĉiuj popoloj en Oriento kaj Okcidento estas tiu de la serĉado de universala humanismo konvena al la teknika erao.* »

A.- En la tria tezo la Federacio de la Protestantaj Eklezioj de Svislando konstatas, ke la nunaj privataj kaj publikaj helpoj neniel sufiĉas. Nur masiva helpo estus nun kapabla resanigi situacion, kies plua difektado povus rapide ekbruligi la tutan terglobon. La mentaleco en la riĉaj kaj mizeraj landoj devas transformiĝi por ebligi la senprokrastan starigon de necesaj supernaciaj institucioj posedantaj povon por internacia planigo kaj arbitrado. Ni citu ĝian konkludon:

Cl.- « *Ni devas ekkompreni, ke la problemoj de la subevoluinta mondo fariĝos rapidege niaj propraj problemoj. Tial urĝas organizi solidarecojn lokajn, regionajn kaj universalajn por kapabli akurate solvi trioblan defion: tiu de la ekonomia progreso en la subevoluinta mondo, tiu de niaj propraj subevoluintaj regionoj, kaj tiu de la estonteco de niaj infanoj.* »

A.- La kvara tezo montras, ke la malhelpoj al la solvo de la ekonomiaj problemoj en la mondo ne estas teknikaj, sed spiritaj, ideologiaj, religiaj.

Kampanjo de André Bieler
Claude Gacond, 151-a radioprelego, 1966.08.24 & 1966.08.27

Cl.- Tiam en la kvina tezo la Federacio de la Protestantaj Eklezioj de Svislando proklamas la responsecon de la kristanoj en la nuna situacio kaj diras, ke la devo de la kristanoj estas nun laboradi al la kreo de la necesaj institucioj ebligontaj veran mondan kooperadon.

A.- La sesa tezo memorigas, ke la ekonomiaj problemoj en la subevoluinta mondo nur povos esti solvitaj per energia helpo de la industriaj landoj.

Cl.- La sepa tezo entenas tre gravan proponon. Ĝi estas la centra punkto de la tuta tezaro. La helpo al la subevoluintaj landoj devus grade atingi tri procentojn de la nacia enspezo en la riĉaj landoj, kun unua tuj ŝtupo de unu procento. Tiun helpon konsistigus nur donacoj, ne alpruntoj. Estas tiu punkto, kiu de monatoj estis diskutata en Svislando kaj ricevis la apogon de ĉiam kreskanta publika opinio, ĉefe en la protestantaj medioj. Ĝin farante la sian la Federacio de la Protestantaj Eklezioj de Svislando oficiale malfermas debaton tutnacion pri la helpo al la subevoluintaj landoj. Reprezentante proksimume la duonon de la svisa loĝantaro tiu Federacio ne povas esti konsiderata kiel politika minoritato.

A.- La oka tezo rebatas malbonintencajn argumentojn diskonigatajn far gazetoj malfavoraj al la internacia kunlaborado. « *La riĉaĵoj monaj kaj cerbaj malŝparitaj en la riĉaj landoj pro stulteco, vaneco kaj prestiĝemo estas nekompareble pli grandaj, ol la malŝparoj en la malriĉaj landoj* », interalie rebatas tiu ĉapitro.

Cl.- La naŭa tezo mencias la demografiajn problemojn kaj memorigas, ke nur ekonomia kresko ebligos bremsi la demografian kreskon.

A.- La tri lastaj tezoj sin turnas al la eklezioj mem kaj rememorigas al ili ilian propran mision porpacan.

Cl.- En la deka tezo ni legas : « *Kiam estos necese konvinki la publikan opinion pri la devo pliigi la financan helpon por la ekonomia progreso, nek la maldekstraj partioj, nek la dekstraj partioj emos enmeti tiun demandon en siajn programojn, tiom la riskoj pri nepopulareco estos grandaj. Tiam la eklezioj povus utile interveni.* »

A.- Bela promeso !

Cl.- Se la eklezioj deziras ĝin plenumi, tiam ili tuj ekde hodiaŭ komencu katekizi siajn anojn tiudirekten. Tiam poste estos pli facile al la partioj plenumi sian politikan funkcion.

A.- Vi aŭdis Radio-Svislandon.

Cl.- Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-